7-a JARO, N-o 323

LEIPZIG, 11. / 12. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE	REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).	APERAS SEMAJNE

CENTJARA SOLENO DE KULTURA HONTAĴO

La francoj preparas sin por soleni en marto de venonta jaro la centjarfeston de la fremdula legio. Pro tiu okazo estas inaŭgurota ankaŭ monumento. Tre saĝe la kultura mondo vualos sian kapon ĉe tiu soleno. Ĉar la ekzisto de fremdula legio povas nur esti sentata kiel kultura malhonorego k la solenado pri centjara estado de tiu ĉi institucio sole kiel malglorego.

La Nacikongreso en 1792 vivigis la unuan francan fremdulan legion. Kontraŭe je la nuna, kiu allasas ankaŭ francojn, ĝi konsistis senescepte el eksterlandanoj. Napoleono havis ja en sia armeo ok tiajn fremdul-regimentojn. La lasta el tiuj regimentoj estas likvidita en jaro 1831 k transformita je legio el fremduloj. Tia fariĝis daŭra institucio de la franca koloni-armeo. La fremdula legio trovas sian aplikiĝon en afrikaj kolonioj, kie ĝi estas uzata por la subpremo al indiĝenaj gentoj tumultemaj. Ekde 1920 ankaŭ Hispanio konas propran fremdulan legion. Ambaŭ armeoj ofte manovras kune. Konata ja estas la longjara batalo en Maroko k Alĝerio, ĉe kiu la francaj k hispanaj legianoj en sama falango strategiis kontraŭ la ribelestro Abdel-krim.

La franca fremdula legio povis persisti tra cent jaroj nur pro tio, ke ĝi estiĝis lasta rifuĝejo por la ŝaŭmaĉo de l' homaro. Ĉiam ree troviĝis riskemuloj; junuloj bankrotintaj en la vivo aŭ kun romantikaj ekdeziroj, kiuj lasis allogi sin per la famo pri legio el fremduloj, kvazaŭ tineoj per la kandela lumo. Sed ĉiam terura por ili estis la elreviĝo. La fremdula legio neniel estas ejo por aventuraĵoj; ĝi ankaŭ ne taŭgas kiel loko por romantikaj travivaĵoj. Ĝi estas kolektejo por mizeruloj malesperantaj, interne rompiĝintaj k el la homara socio forpuŝitaj; homoj, kiuj tiras malsupren ĉiun, kiu rifuĝas en ilian societon. Kaj kiu jam troviĝis en tiu ĉi societo, tiu malfacilege ree forkuros el ĝi. Sed se iu sukcesas, li estas kadukulo jam . . . Multajn ekslegianojn mi ekkonis en Sud-francio, nun civiliziĝintajn — hom-



ruinoj, korpe k spirite pereigitaj! Kruela k barbara estas ofte jam la traktado nehominda fare de superuloj. Tro penigaj la lacegigaj marŝadoj en arda polvo k soifego. Marasmiga k kadukiga la eterna batalo kontraŭ obstinaj rotoj el araboj k beduenoj. Multaj certe terenfalis pro trostreĉo de fortoj; mortaĉis en tiu legio, estis formanĝitaj de hienoj k perknopteroj[1]. Mizeruloj, super kies ostoj blovas la brulsablo en ŝtormo de dezerto. Malebla estas forkuro! Malofte sukcesas forkurprovo, k ofte restas memmortigo la sola vojo el tiu ĉi infero de Afriko.

Internacie miksita mizerejo estas la franca fremdula legio. Proksimume 20 diversaj nacioj estas reprezentitaj. Laŭ oficialaj konstatoj plej granda parto el la legianoj estas germanoj, preskaŭ la duono (inkluzive aŭstroj k elzasanoj). Kompreneble, Germanio kiel najbara lando, estis jam antaŭmilite fruktodona teritorio por sekretagentoj, varbantaj bravajn soldatojn. Sed precipe dum la okupado la francoj povis facilege praktiki tiun rekrutadon. Kiom da junaj germanoj malkapablis spiti al propra fatalo pro soldata aventuremo! Post la germanoj estas la vico de l' rusoj, kiuj ofte pro pura malespero je vivo transiris en legion el dispelitaj korpusoj. Ankaŭ svisoj k belgoj estas multnombraj; malpli ofte francoj mem, kiuj pleje serĉas rifuĝon en la fremdula legio, pretekstante ajnan fremdan nacianecon. Sporade oni trovas hispanojn, italojn aŭ polojn. Legianoj el Balkanlandoj — granda kvanto — estas timataj pro sia bruteco. Holandanoj, skandinavoj, angloj k usonanoj estas esceptoj en la franca legio.

La forlaso de l' legio estas tiel malfacila, kiel facila estas la eniro. Legitimiloj ĉe l' eniro ne estas postulataj; indikojn pri aĝo oni ne kontrolas; falsajn nomojn oni akceptas kiel memkompreneblaĵon. Ĝenajn demandojn oni ne faras al rekrutitoj. Post akcepto ŝipo transportas ilin de Marsejo transmaren, k la rekrutaro atingas la tendaron Sidi-bel-abbes, proksime de Orano (Alĝerio). Tie la juna soldato estas ekkaptata de maŝino, kiu aŭ disrompas lian vivon aŭ faras sklavon el li. Kiel punulo kun kaphararo mallonge tondita, la mizerulo travivas maldolĉan tempon dum la militista edukado daŭranta kvaronjaron. Tiam li aniĝas al la legio.

Intertempe li spertis du aferojn: unue, ke meze de elkraĉaĵo de l' homaro li devas kutimiĝi al plej malaltaj moralkonceptoj k devas kontentiĝi pri plej malaltaj vivkondiĉoj; due, ke la legiano estas ekzilito, kiun oni ĉie renkontas nur kun malestimo.

---

[1] Speco de vulturoj.

En tiu tempo estas skribataj leteroj malesperaj al gefamilianoj k al hejma konsulo. Tamen neniu kapablas helpi. La legio ne forliberigas el siaj ungegoj, antaŭ ol forpasis la plena tempo de servo-kontrakto, provizore 5-jara. (De antaŭ nelonge ja povas efektiviĝi la maldungo pri militservo por uloj ankoraŭ ne 18-jaraĝaj, post petpostulo de kuratoro!)

Sidi-bel-abbes, kiu entenas la bivakojn k barakojn de l' franca fremdula legio, estas ekfloranta kolonia urbo kun vigla societa vivo. Tie kalejdoskopas gaja agado, se dimanĉon la legia orkestro muzikas sur la placo. Nur la fremdlegiano estas ekstere de la vivo. Kvazaŭ kaŝite li devas rigardi, kiel pri vivo aliaj rajtas ĝoji. Por li restas nur la drinkejo; tien portante la malgrandan salajron, li elspezas ĝin por alkoholaĵoj; sed nur tie li ja estas taksata ankoraŭ plenvalore. Kaj restas plie al li ankoraŭ — la bordelo. Alia interkomunikilo por li ne ekzistas, ĉar li ja portas la brulstampon de l' pariao.

Dum varmegaj noktoj, en kiuj neniu povas trovi dormon, atakas la legianon nostalgio. La sonoj de iu slava aŭ norda kanto tremas tra la nokto. Estas ajna popolkanto el infantempo. Rememoroj vekiĝas. En la sonojn miksiĝas la ĥoro de l'aliaj. Tiam forsonas la kantado. Jen subite — akra pafo tratranĉas la mallumon. La melankolio frakasis iun. Li estis kaŝe preninta fusilon k helpe de ŝtelita kartoĉo ĉesiginta sian vivon. La deĵoranta suboficiro informiĝas k finas la kazon per la vortoj "Refoje la *cafard!*"

"Cafard" estas tiu melankolio, kiu foje perfortas preskaŭ ĉiun legianon en la seka klimato k en ĉiam danĝera vivaĉo sub la senkompata sunbrilado. Unu estas pelata al memmortigo, alia al drinkado k maldisciplinaĵoj. Oni konas *cafard* en la legio k tial ne estas tro punata pro drinkado aŭ nedaŭra dizerto. Du aŭ tri legianoj malaperas je kelkaj tagoj, dum kiuj ili ĝuas neligitan vivon. Se ili revenas libervole, la delikto per unusemajna karcero jam estas elpagita. Ĉar en tiu infero nur la apatiiĝinto toleras sen *cafard!*

Ĉiu ĉi homsuferego pro vanta honoro al granda nacio! Tamen la monumento pri centjara ekzisto de franca fremdula legio estos plej solene inaŭgurata k — la kulturhontaĵo pludaŭros. Sed oni ne rajtas forgesi ĉe malkovro de tiu monumento pri tiom da homa tragiko, pri tiom da viktimoj de fia sociordo, ĉagrenoj k formortaĉo de l' fremdul-legiano k pri la *cafard* . . .

Ajo (15 455).

Se vi volas legi bonan prolettendencan literaturon en esperanto, abonu al

LA NOVA EPOKO

monata organo de SAT!
Unuopa kajero 0,35 mk. g.

EL FRANCIO

Por la restarigo de l' sindikatara unueco en Francio

Unuafoje depost la disiĝo de l' sindikataro en Francio per la postmilita evoluo de l' laborista movado estas farita energia k publika paŝo por krei la fundamenton por restarigo de l' sindikatara unueco. Antaŭ kelkaj semajnoj Ziromski k Dunŭa (Dunois) entreprenis provon en tiu direkto per la socialista ĉiutaga gazeto "Le Populaire", sed trafis riproĉojn de la gvidantoj de l' reformema sindikat-unuiĝo k devis ĉesi priparoli la aferon en la nomita gazeto. Tiam okazis, je 9. novembro, en Parizo kunveno el influhavaj membroj de tri sindikataj unuiĝoj, nome la Konfederacio Ĝenerala de Laboro (C.G.T.-reformema), reprezentita de Monat (Monatte), Dumulen (Dumoulin) k 5 aliaj K-doj, la Unuigita Konfederacio Ĝenerala de Laboro (C.G.T.U. — komunista), reprezentita de Ŝambelan (Chambeiland), Rambo (Rambaud), Engler, Devo (Deveaux) k 4 aliaj K-doj, k la Aŭtonomaj Sindikatoj, reprezentitaj de 7 K-doj[1]. Ĉi tiuj interkonsentis en tiu kunveno pri komuna manifesto, kiu estis publikigata en "Le Cri du Peuple", semajna organo por sendependeco de l' sindikatismo. Jen la ĉefaj alineoj el tiu manifesto:

"Ili (t. e. la kunvenintaj sindikatanoj — Trad.) konsideris, ke la koncentrigo pli k pli intensa de l' kapitalismo, ke la forto pli k pli granda de l' mastra organizo k la disvolvo de ĝiaj rezist- k subprem-rimedoj igas ĉiutage pli malfacila la agon por plibonigi la ekzist-kondiĉojn de l' laboristoj.

"Ili konsideris aliparte, ke la disvolviĝo de l' militisma politiko de la registaroj, la armad-konkuro, la etendiĝo de l' faŝismo en multnombraj eŭropaj landoj, metas la proletaron antaŭ la duoblan danĝeron de l' milito k de l' diktaturo.

"Ili ekkonis, ke la stato de l' malkoncentriĝo k dispecetiĝo de l' organizoj de la laborista klaso permesas al la kapitalismo, militismo k faŝismo ĉiujn aŭdacojn, ĉiujn ŝtatrenversojn, ĉiujn atakojn al la vivo de l' proletaro.

"Ili interkonsentis, ke post dek jaroj da fratmortiga duelo necesas fari klopodon por fini la dividitecon de l' sindikataj fortoj.

"Ili akordiĝis por disvastigi la ideon pri la restarigo de l' sindikatara unueco en unu Centro sindikatara unueca, sur la bazoj de l' Ĉarto de Amien (Amiens). La realigo de tiu ĉi ideo kompreniĝas, laŭ ilia opinio, nur en la praktiko de l' klasbatalo k en la sendependeco de l' sindikata movado, ekster ĉia enmiksiĝo de l' politikaj partioj, frakcioj k sektoj, kiel ankaŭ de l' registaroj . . ."

La manifesto komencis jam elvoki grandan diskutadon. Tiel la reformemaj, kiel la komunistaj sindikat-unuiĝaj gvidantoj esprimis sian malaprobon al la projekto.

[1] Ne partoprenis en tiu kunveno la Revolucia Konfederacio ĝenerala de Laboro (C. G. T. R. — anarko-sindikatista), kiu cetere estas tre malforta.

Ni dronas en manuskriptoj!

Kiel ni povas konigi ĉion presindan al la legantaro, se "S-ulo" restas nur 8-paĝa?

Varbu, K-doj, varbadu, por ke ni baldaŭ povu ree aperigi 12-paĝajn numerojn!

Katolika pastro — ateista verkisto

Nova skandalo trafis la katolikan eklezion. La 71-jara pastro Turmel en Ren *(Rennes)*, Francio, estas ekskomunikita de la papo en plej rigora formo: li fariĝis "eksterleĝulo" por la eklezio, al kiu estas malpermesite ĉeesti diservon, eĉ havi iujn interrilatojn kun fidelaj katolikoj, komune manĝi, loĝi kun ili ktp. (Esceptitaj estas nur la parencoj k geservistoj.) Tiu puno estas aplikita nur al 5 aŭ 6 vivantaj personoj.

Kial tia rigoro? Ĉar Turmel ludis tre lerte duoblan rolon. Dum preskaŭ *duona jarcento* li servis unuflanke ŝajne fidele al la katolikismo kiel pastro, ne montrante signojn pri herezo; li faris mesojn, preparis al komunio infanojn ktp. Sed aliparte — flanke de tiuj servoj, li verkis multnombrajn librojn kontraŭ la dogmoj de l' eklezio, en tute ateista senco, kiel ekzemple montras sekvanta lia skribaĵo: "Dio estas monstro. Prefere ni diru, ke ĝi estus monstro, se ĝi ekzistus. Ĝi estas terura inkubsonĝo produktita de la rezonado en servo de deliranta imago."

Restante en la vicoj de l' eklezio, li tiom pli trafe vundis ĝin per siaj sagoj. Liaj libroj aperis sub deksep diversaj pseŭdonimoj. La bibliografio pri tiuj ĉi pseŭdonimoj estas publikigita en 70 n-oj — artikoloj de revuoj k libroj — en la "Bulteno de l' eklezia literaturo". Kompreneble ĉiuj ĉi libroj estas metitaj en la indekson (liston de al katolikoj malpermesitaj legaĵoj), ankaŭ tiuj, kiujn li verkis kun modera herezemo sub sia propra nomo. Antaŭ 3 monatoj, kiam li estis elkovrita kiel aŭtoro de l' ateistaj, herezaj verkoj, li devis respondi antaŭ la superaj eklezioj. Li venis al tiu tribunalo, sen advokata asisto, k prononcis, ke li havas nenion por repreni de tio, kion li diris. Sekve de tio la afero estis transdonata al la Vatikano, de kiu nun venis la ekskomunik-ordono.

Kontraŭmilita amaskunveno en Bern

La pasinta dimanĉo estis vere ĝojplena tago por la Berna socialistaro. Malgraŭ pluveta vetero la Gek-doj el la okcidenta parto de Svisio renkontiĝis por esprimi sian kontraŭmilitan emon. Rigardante la amasegon da partoprenantoj, la koro de ĉiu K-do certe estis tuŝita pro tiom da idealismo por nia afero. La manifestacio tra la stratoj de l' urbo postlasis grandan impreson, ne nur ĉe la proletaro, sed eĉ ĉe parto de l' burĝaro. 18 mil Gek-doj, maljunaj k junaj, manifestaciis. La socialista junularo, infanamikoj k ruĝaj falkoj formis la pinton de l' manifestacio. 300 standardoj flirtantaj en venteto altiris la rigardojn de ĉiuj. Sur la placo antaŭ la federa palaco kunvenis 25 mil homoj post la manifestacio. Ili atente aŭskultis la kontraŭregistarajn paroladojn de l' oratoroj, K-doj Pere (Perret) k Grim (Grimm). Unu parolis franclingve, la alia germane. Dulingvaj paroladoj estis necesaj, ĉar granda parto de l' ĉeestantoj estis franclingvanoj. Por ni esperantistoj montriĝis la evidento, ke komuna lingvo estus vere tre taŭga ilo por pli sukcesigi tiajn aranĝojn.

La du oratoroj kondamnis per akraj vortoj la intencatan plialtigon de l' militbuĝeto (ĝis nun 100 milionoj k post plialtigo 125 milionoj da frk.). Konsiderante, ke ĉi-landa neŭtraleco tute dependas de favoro de l' eksterlando, oni prave povas nomi tiajn agojn frenezaj. En Svisio sociaj institucioj estas tiel malmultnombraj, ke la proletaro neniam subtenos la intencon de l' registaro plialtigi la militbuĝeton, anstataŭ disponigi tiujn sumojn por sociaj aferoj. Per ĉi lasta ago la svisa registaro pli efike helpus plibonigi la socion ol per eldiroj de dungita pastraro.

Senfina aplaŭdo pruvis, ke la tuta ĉeestintaro estas preta, agi laŭ la eldiritaj devizoj. Ĉiu aŭskultinto sendube disvastigos la kontraŭmilitan pensadon. Sed nura pensado certe ne sufiĉas por antaŭenpuŝi la kontraŭmilitan movadon; do, K-doj, ni agu!

Hazarde mi renkontis esp. K-dojn el la Nojenburga Ĵuraso *(Neuenburger Jura)*, kore salutatajn ĉi tie! Ĉu dum venonta manifestacio flirtos ankaŭ ruĝa esperantista standardo, sub kiu amasiĝos la lab. esperantistaro? Renkontiĝoj ne okazu hazarde, sed laŭplane. Tiel oni povus atentigi la publikon. Ĉar ĉi tie estas uzataj 3 lingvoj, eĉ 4, se oni ankaŭ enkalkulas la romanĉan lingvon, ni preskaŭ ĉiutage spertas la lingvajn barojn. Ni estu la pionira taĉmento en batalo por nia idealo, por efektivigo de l' socialismo. Inter la rimedoj en tiu batalo esperanto ja estas unu el la plej taŭgaj. Nia klopodo estu, per unu movado plifortigi la alian.

Berna SAT-ano 14 103.

Multajn petojn ni ricevas de sovetiaj K-doj,

kiuj deziras resti plue abonantoj al "S-ulo"!

Kiu helpos? Pruvu senton de proleta solidaro! — Pagu helpabonon por sovetiano al

ADMINISTREJO DE SAT!

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Memortago en Hispanio

En ĉi tiu jaro ni pensas kun aparta ardo je la 30-a de novembro 1921, neforgesebla dato en la historio de l' hispana proletaro. La du laboristaj gvidantoj F. Lagret k S. Segi estis mortpafataj en tiu dato, meze de la strato en Barcelono, Lagret, kiu naskiĝis en 1880, paroladis kontraŭ la milito en Maroko k pro tio estis malamata de la burĝaro. Kelkajn horojn post la mortpafo al li atingis Segi'n la sama sorto. Nun batalante por nova epoko, ni ne forgesas tiujn du pionirojn, kiuj kun entuziasmo k amo oferis sin por la laborista afero — afero de l' Homaro. *15 412*

Akriĝo de kamparaj konfliktoj en Japanio

La industria paniko pliakrigis ankaŭ la kamparan krizon k plimalbonigis la vivnivelon de l' kamparanoj. Ĉar la prezo por rizo malaltiĝis sub produktokoston, la kamparanoj k ankaŭ mez- k et-bienuloj rapide bankrotas. Ankaŭ la silkfabrikado, pro malkariĝo de l' prezoj por silkfadeno, ekhavis grandan deficiton, kio havis kiel sekvon mallongigon de l' labortago aŭ tutan laborĉesigon. Kiel solvon por la senlaborula problemo la registaro rekomendas reiron al la kamparo de industriaj laboristoj. Tio konsekvence malbonigas la vivon de l' kamparanoj, k la kriza stato de l' japana terkulturo pliintensiĝas. En 1929 (laŭ oficiala statistiko) okazis 2293 kamparaj konfliktoj, kiujn partoprenis 18 270 bienuloj k 77 365 malriĉaj kamparanoj. El tiuj konfliktoj 66% estas solvitaj k 35% nesolvitaj.

Kiel propagandisto en Anglio

Ofte ni jam legis en "S-ulo" plendojn pri vojaĝantaj Gek-doj. Fakte ni devus lerni dece utiligi la vojaĝojn por nia komuna celo pere de "S-ulo". Mi mem ŝatas vojaĝi. Lastan jaron mi iris Hispanion (miaj impresoj aperis en n-o 265 de "S-ulo"). Ĉi-jare mi ĉeestis la 10-an Kongreson de SAT k poste restis en Anglio 1½ monatojn. Sed antaŭ ol entrepreni la multekostan vojaĝon, mi bone preparis min, antaŭ ĉio ŝparis la necesan monon. Ĉar mi ne volas malutili la disvastiĝon de nia lingvo per kvazaŭa almozpetado por vojaĝi, kiel bedaŭrinde faris kelkaj K-doj, kiuj trapasis Grenoblon, mian loĝurbon.

Laŭ mi, vojaĝantaj K-doj neniam devas apogi sin sur la helpemo materia de vizitataj Gek-doj. Ili nur devus deziri helpi la propagandon per eksterlanda vojaĝo.

Nun pri mia vojaĝo tra Anglio, kiu unue kondukis min al Dabi (Derby), kie mi restis plej longe. Antaŭe jam korespondinte kun tiea K-do, mi trovis ĉe proleto-K-do la deziritan loĝejon k pagis malavare la demanditan sumeton por nutraĵo k loĝado, kiu estis malalta kompare kun la ordinara prezo. Tute malsukcese mi provis daŭrigi mian studadon de angla lingvo, kiun mi jam lernas de tri jaroj. Post unumonata restado la rezulto estis nula: mi ne povis interkompreniĝi kun la edzino de l' gastiganto, do mi decidis dediĉi mian tempon al esp. propagando. Mi skribis al diversaj grupsekretarioj k vojaĝis je 1. septembro al Liverpulo (Liverpool), postan tagon al Manĉestro (Manchester), kie min atendis K-do Dan (Dunn), kies familianoj ĉiuj estas esp-istoj. Li deziris min gastigi k mi devis akcepti. Sekvantan tagon mi renkontis kelkajn Gek-dojn, inter ili Gek-dojn Frans (France). K-dino Frans, kiu venis en Grenoblon dum 1927, volis gastigi min almenaŭ unu tagon k deziris, ke mi vizitu la Stokportan grupon. Konsentinte, mi iris en ŝian hejmon, k ŝi poŝtkarte kunvokis la tutan membraron je mia honoro. K-do Frans, kiu akompanis min al alia K-dino, ne parolas esp-on, k tute sensukcese mi provetis interkompreniĝi per signoj, kiam ni ne renkontis hejme tiun esp-istinon, kies edzo ankaŭ ne scipovas esp-on.

Posttagmeze estis renkontiĝo de Gek-doj ĉe K-dino Ŭajld (Wilde), kie okazis tetrinkado kun kvin junaj ŝiaj fratoj, kiuj antaŭe ĉiam moketis ŝin pro ŝia esperanto-lernado, sed nun ekkomprenis la valoron de nia lingvo k promesis ĉiuj fariĝi esp-istoj. Vespere mi paroladis ĉe la Stokporta laborista esp. grupo en bone vizitita kunveno. Kompreneble mi parolis pri la unuiĝo de l' proletaro per esperanto k neceso de esp-o por starigo de l' socialismo.

Same mi devis paroli la sekvantan vesperon en Manĉestro, kie dum la

Malpliiĝo de kompromisoj k pliiĝo de nesolvitaj kazoj kompare kun 1928 montras la akriĝon k disvolviĝon de l' konfliktoj. Depost 1928 la nombro de arbitraciaj juĝoj malpliiĝis; male pliiĝis la konfliktoj.

Laŭ "Scienco Proleta" n-o 11.

Tolaĵo por novenaskitoj

Depost kelkaj jaroj la komunumo Vieno disdonas tolaĵojn por novenaskitoj, egale ĉu la patrino estas edziniĝinta aŭ ne. Necesas nur, ke la gravedulino antaŭe sciigu la magistraton, k post la akuŝo urba prizorgantino persone transdonas ruĝan pakaĵon al la patrino kiel unuan donacon de la socio al la nova civitano. La ruĝa skatolo enhavas: 1 infanveston, 6 ĉemizetojn, 6 jaketojn, 2 umbilikobendojn, 1 kovrilon, 2 gum-enmetaĵojn, 2 flanelojn, 24 tukojn, sapon, ŝmiraĵon, haŭtopulvoron k 1 bantukon, ĉio unuakvalita. (Valoro 60 aŭstriaj ŝilingoj = 8.50 dolaroj). La patrino devas esti Viena civitanino k konstante loĝi en Vieno.

Ĝis nun la komunumo disdonis el tiuj suĉinfanaj ekipaĵoj:

9 781 pakaĵoj en jaro 1927
11 808 pakaĵoj en jaro 1928
11 730 pakaĵoj en jaro 1929

sume 33 319 pakaĵoj po 60 ŝil. = 2 000 000 ŝ. (285 000 dol.)

La burĝaro furioze agitas kontraŭ tiu "malŝparo de impostmono" k minacas perforte forpeli la "marksistajn" urbadministrantojn, ĉar ili celas malebligi, ke estonte proletido estu envolvita en ĉifonoj aŭ papero, se la gepatroj ne povas aĉeti tolaĵon — kiel okazis antaŭmilite dum regado de l' "kristan-socia" partio.

F. S., Vieno (16 362).

Centra Domo de Kamparano

Miloj da vilaĝanoj vizitas en nunaj tempoj Moskvon pro la plej diversaj aferoj k bezonoj — kiel privataj (personaj), tiel same ankaŭ sociaj (kolektivaj). Alveturinte el vilaĝo, la vilaĝanoj ne povas longtempon kutimiĝi al ĉefurba vivo k bezonas ricevi la plej diversspecan helpon, k plejparte klarigojn: kiel k kien iri, kion k kie necesas fari, kian skribpeton aŭ leteron k al kiu skribi; al ĉiuj ĉi demandoj la vilaĝano ricevas detalajn respondojn en Centra Domo de Kamparano.

En ĝi deĵoras por tiu celo juristoj, agronomoj, kooperativistoj, kuracistoj, politik-laborantoj. Krom tio en Centra Domo de Kamparano ekzistas ankoraŭ komunloĝejo por 600 litoj, ŝvitbanejo, polikliniko, biblioteko, granda agrikultura muzeo, kie multon oni povos lerni. Ĉiuvespere estas farataj lekcioj, raportoj, estas interparoladoj kun scienculoj, kiel pli bone aranĝi la vivon. Oni prezentas kino-filmojn. Oni aranĝas spektaklojn, koncertojn.

Ĉio ĉi estas farita por vilaĝanoj de la soveta potenco. Dum jaro la Centran Domon de Kamparano vizitas dek-miloj da vilaĝanoj alveturantaj. Oni akompanas ilin al fabrikoj, muzeoj k diversaj oficejoj Moskvaj — por montri, kiel laboras k vivas urbaj proletoj, kiel ili organizas sian laboron, moraron k kulturon.

Tiaj vizitoj al laboristoj en entreprenoj de alveturantaj vilaĝanoj efektive firmigas la kunligon de l' urbo kun la vilaĝo, k konatiĝo kun moraro de la laboristoj disigas ĉiujn dubojn pri ekzistanta kvazaŭa neegalo inter laboristoj k vilaĝanoj. Kultura priservo al vilaĝanoj portas en la vilaĝon ĝermojn de nova vivo.

La Centra Domo troviĝas en centro de l' urbo Moskvo.

Elrusigis Vjaĉeslav V. Kalaŝnikov (1125), Niĵni-Novgorodo.

PRIPENSINDE

Tial ke foje ni parolis pri "rusto ĉe Sovetia ŝtataparato", troviĝis fanatikuloj por indigne ekkrii: "Vi atakas Sovetion! Vi aliĝis al la kontraŭsovetia fronto . . ." ktp. ks. Kaj malsinceruloj kun ŝajnigita indigno kriaĉis samtone.

Nu, kion ni vidas hodiaŭ? En Moskvo okazas proceso kontraŭ personoj, okupintaj plej gravajn postenojn en la Sovetia ŝtataparato. Ili estas akuzataj pri intenca fuŝado en la efektivigo al la "Kvinjara Plano". Se ili estas kulpaj, ĉu tio ne estas plej elokventa pruvo pri ekzisto de rusto ĉe la koncerna aparato?

Nur naivuloj aŭ blinduloj povas kredi, ke sufiĉas loĝi en Moskvo k okupi tie postenon por meriti ateston pri lojalo al la laborista klaso. Estas personoj, kiuj ludas sufiĉe bone komunistan rolon. Sed homoj saĝaj ne identigas aktoron kun la persono, kiun li prezentas en teatraĵo. Senmaskigi karieriston, tio ne estas "ataki", sed male defendi Sovetion. Aristark.

FRENEZAĴOJ

La mondo apartenas al la senhontuloj. La milito estas la ora epoko. La homo, kiu dormas sur la tero, ne ŝanĝus sian sternaĵon kontraŭ alia. Por honestulo la agado estas ebla nur ĉe milito. La ĝojo mortigi estas profunda. La tagoj, dum kiuj finiĝas militoj, estas funebraj tagoj por la bravuloj. Ci ne bezonas kompreni la popolojn, ci bezonas nur ilin malami. Krom la naskado ĉe la virino k la milito ĉe la viro, la homa estaĵo estas nur malnoblaĵo k malpuraĵo. La pacismo estas atenco kontraŭ la honoron. Estas la noblo de l' milito, ke ĝi disrompas kontraktojn. La justuloj ŝatas la militon, tial ke ĝi ebligas estimi tiun, kiu batas nin. La milito estas sankta, tial ke en ĝi forestas la justo. La rabado ne estas ŝtelado, ĝi estas revenĝo de la libero. La homo, kiu perceptas la militon kiel okazon por agi malbone, ne devus naskiĝi.

Renato Kenton (Réné Quinton)
El la franca kolektis k tradukis *Ajnulo.*

---

diskuto iu K-do demandis min pri la signifo de Sovetio, kiun tiu laboristo ŝajne tute ne estis kompreninta. Mi ankaŭ donis klarigojn pri la problemo de montranspago el Sovetio al SAT, tiom, kiom mi povis, ĉar pri tio multaj havas malĝustan komprenon. Je la fino mi adiaŭis amike de l' tiea rondo kun la sento de plezuro pri la eblo trakti eĉ gravajn temojn en esp-o kun alilandanoj.

La 5. septembro mi revenis al Dabi, kie antaŭ mia foriro definitiva oni aranĝis laŭ mia propono publikan kunvenon, kiu okazis en la Laborpartia domo (por la unua fojo, ke esp-o aŭdiĝis en tiu domo!). La lokaj gazetoj malatentis la tiuokaze de l' grupsekretario senditajn artikolojn; sekve nur ses neesp-istoj ĉeestis, bedaŭrinde, tiun kunvenon. Unue estis anglalingva propagandparolado de l' kunven-prezidanto, poste mi parolis pri la lingvaj baroj, kiujn mi mem renkontis vojaĝante en Anglio k deduktis la neceson de esp-o.

Reveturante mi trapasis Londonon k vizitis la tiean Orientan Grupon, kie pro nescio pri mia vizito ne tre multaj Gek-doj ĉeestis k oni babilis pri la SAT-kongreso, kiun ĉiuj cetere ĉeestis. Tri tagojn poste mi estis en Parizo, kie post vizito al Redaktejo de "S-ulo" mi ĉeestis pro scivolemo la kunvenon de l' Pariza lab. esp. grupo. Ankaŭ tie mi estis devigata, tute nepreparite, raporti pri miaj impresoj, kion mi faris rapide, ĉar la saman vesperon mi envagoniĝis al Grenoblo, kie finiĝis mia vojaĝo. Hejmen reveninte mi faris k faras mian plejeblon por diskonigi la utilon de esp-o k ne timas, ke iu povu riproĉi al mi ion. Se tamen mi eraras, mi estus dankema al tiu, kiu atentigos min k donos al mi konsilojn por agi pli trafe alian fojon. Coll (7998).

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

Por havi klaran bildon pri la nuna situacio en SAT
necesas nepre legi la
Protokolaro de la X.SAT-Kongreso en Londono
(3.–7. aŭgusto 1930).
84 dense presitaj paĝoj. Form 15×22 cm.
Escepta prezo: *0,50 mk. g.* (sen kroma membro-rabato!)
PARIS XX, 23, rue Boyer / LEIPZIG O 27, Colmstrasse 1.



Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstr. 14
Neckarsulm (Germanio).

Ni reorganizu nian Junularsekcion!

Unue, mi donu mian klarigon k opinion koncerne la malhavon de raportoj ĉe la fakkunsido en Londono. Kelkajn semajnojn antaŭ la Kongreso K-do Keŭning pro sia senlaboreco k malsano sciigis al mi sian neeblon partopreni la Kongreson; ankaŭ pro la nekontentigaj respondoj de la O. K. K. li petis, ke mi daŭrigu la laboron k prizorgu la junular-aferojn ĉe la kongreso, provu grupigi la junk-dojn en iliaj loĝejoj ktp. Mi faris tion, sed mallonge antaŭ mia foriro al Londono oni sciigis, ke mi tuj komencu labori proksimume 100 km de mia hejmo. Mi ekinformis la O. K. K. pri mia neeblo bedaŭrinda partopreni k petis, ke la raportoj estu transdonataj al la estro de la fakkunsido — mi ankaŭ skribis al la fakkunsido mem. Post unu monato mi sciiĝis pri la manko de l' raportoj per germana K-do vizitanta mian loĝurbon. Kiu kulpas? Nek la sekciestro, nek, miaopinie, la O. K. K. La sekciestroj ne povis partopreni, k la O. K. K. pro la indiferento ĝenerale de la Londona laboristaro al la Kongreso — eble pro la subtenado de la "Labora" registaro al la neŭtrala kongreso — estis tro okupita pri kongresaferoj por atenti la junularan fakkunsidon[1].

Gek-doj! Ni mem kulpas. Ni devas plifortigi nian organizon. Ĉu politike, kulture, eduke aŭ industrie, la tutmonda laborist-junularo pli k pli estas subpremata de l' sennacieca kapitalismo. Pli k pli ni devus celi unuiĝi k interrilati por kontraŭbataladi tiun viv-forprenanton de l' junularo. Dum valoraj pensoj k minutoj perdiĝas pro la favorata uzado de naciaj lingvoj ĉe laborist-junularaj kongresoj internaciaj, miloj da junaj geproletoj — la estontaj registoj de la mondo — sklaviĝas sub la kapitalismo, faŝismo k

[1] Tiu ĉi defendo ŝajnas al mi malforta, se oni konsideras la proporcian kvanton da gejunuloj partoprenintaj. Ili ja reprezentis grandan elcenton el la kongresintoj. — *A. S. (10 580).*

NIA POŜTO

15 207 Kamerer, 7514. Viaj artikoloj uzotaj.

Al multaj. Kiel verki artikolon? Simple, koncize, interese! Pri kio verki? Pri ĉio, kio koncernas junularon, ne *nur* pri mizero k turmento, prefere pri via laboro ĝin kontraŭagi, pri viaj laboro, aranĝaĵo en grupoj k movado, lernejoj ktp. A. S.

LULILA KANTO

Teksto k muziko de Henriko

Ne tro rapide

Gitaro aŭ liuto

Ŝton', ŝton', ŝton' - por- ni lu- - li - lo, ŝton', ŝton', ŝton' - por - ni la tomb', en mu - ci - daj lu - ka - zer - noj pa - sas ni - a viv' sen pomp'. Fino

Ŝton', ŝton', ŝton' — por ni lulilo,
Ŝton', ŝton', ŝton' — por ni la tomb'.
En mucidaj lukazernoj
Pasas nia viv' sen pomp'.

Et-, et-, eta nia vivo,
Et-, et-, eta — la feliĉ'.
En fabrikoj, ĉe maŝinoj
Nin minacas fikondiĉ'.

Long-, long-, longaj labor-tagoj,
Long-, long-, longa — nokt-malhel'.
De l' fajfil' akrega sono
Trompis nin pri tempo-ŝtel'.

Ruĝ-, ruĝ-, ruĝa — la espero,
Ruĝ-, ruĝ-, ruĝa — nia sang'.
El la stratoj, el stratetoj
Ĝi ruliĝas — ruĝ-lavang'.

Lukt', lukt', lukt' ekde lulilo,
Lukt', lukt', lukt' ĝis fina mort'!
Fratoj! Supren ruĝ-standardon!
Iĝu for mizera sort'!

TRA ESPERANTIO

Kial Demidjuk defendas personojn?

El la nuntempaj opoziciuloj en SAT K-do Demidjuk distingiĝas per siaj ŝajnobjektivaj atakoj...

Multon faris tiu K-do por nia organizo. Se ĝi povis enradikiĝi en Sovetio, estas grandparte dank' al lia lerta taktiko, aplikata dum kelkaj jaroj. Ne malpli lerte aliaj Moskvanoj jam penadis tiutempe malsukcesigi la entreprenon... La hodiaŭaj sagoj, per kiuj pafas al mi K-do Demidjuk, ne povas malhelpi, ke mi juste k ŝate taksas lian pasintan agadon. Ne utilus esplori, kial li ŝanĝis sian sintenon. Kiam oni estas inter lupoj, eble necesas ankaŭ bleki lupe...

Pro la ĉi-supraj konsideroj mi do opinias utile respondi al iu artikolo de K-do Demidjuk, aperinta lastatempe en partia gazeteto sub jena titolo: "Kial Lanti atakas personojn?" Inter diversaj riproĉoj, tute nepravigeblaj, li direktas al mi kritikon, kiu estas tute ĝusta k kiun mi volonte akceptas. Estas ja vere, ke neniam mi estis "amas-revoluciano". Se tia mi estus, ne al SAT mi dediĉus miajn modestajn fortojn. Mi batalus en iu partio, agitadus per la kutimaj k facilaj procedoj, kiujn aplikas la politikaj agitistoj. Mi konfesas, ke nenian emon k kapablon mi havas por tia laboro. Mi decidis elspezi mian energion en SAT, tial ke ĉiam mi celis fari el ĝi edukan, klerigan, kulturan aparaton. En la plej unuatempaj propagandiloj oni povas, ekzemple, legi jenon:

"La ideala socio ne devenos tute preta el Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon. Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondcivitanoj, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata, enlanda edukado metis, dum nia infanaĝo en niajn kapojn k korojn."

Tio k alio simila estas de mi skribita antaŭ *dek-unu* jaroj k montras klare la dekomencan edukan karakteron, kiun mi celis doni al SAT. Tion ankaŭ aprobis tiutempe K-do Demidjuk. Nur antaŭ ne tre longa tempo li ŝajne ŝanĝis sian opinion. Kio estis aprobinda dum pluraj jaroj, tio fariĝis "oportunisma" en liaj okuloj. Estas permeseble ŝanĝi sian percepton pri io. Sed restas la *fakto*, ke K-do Demidjuk estis antaŭ ne longe ankaŭ "oportunisto". Kiu sekve "revizias"? Ĉu Lanti? Ĉu Demidjuk? Ne povas esti dubo pri tio. K-do Demidjuk k ne mi estas la "reviziisto". Mi ja ne ŝanĝis mian opinion pri la starpunkto de SAT k hodiaŭ, kiel antaŭ 11 jaroj, povus subskribi la tiutempajn propagandilojn.

Nia K-do bone scias, ke mi posedas sufiĉe da dokumentoj el lia p r o p r a m a n o por pruvi tion, kion mi nun asertos: Se mi povis akiri opinion pri iaj "personoj", estas parte dank' al propraj informoj de K-do Demidjuk mem. Hodiaŭ li *revizias* k aliĝas al la partio de tiuj, kiujn li kontraŭbatalis antaŭ pluraj jaroj. Estas sendube lia rajto, sed li ne rajtas akuzi aliajn pri peko, kiun li mem faris. Ankaŭ ne estas peko revizii, sed oni faru tion tute malkaŝe k ne akuzu tiujn, kiuj volas gardi nian Asocion tia, kia ĝi estas laŭstatute ekde sia fondiĝo.

Sed estas tute ĝuste, ke mi ne estas k neniam estis "amas-revoluciano". Tio ne signifas, ke mi ne kapablos fari mian revolucian devon en taŭga momento. Prirevoluciajn lecionojn mi ne akceptas de K-do Demidjuk, k, ĉefe, ne de karieristo, kiu ŝanceliĝas dum tuta semajno por decidi ĉu aliĝi al la revolucio aŭ ĉu resti lojala oficiro; mi ne akceptas tiajn lecionojn de homoj, kiuj ĉiam estas ortodoksaj, t. e. ĉiam kun la pli fortaj... Se por montri mian "oportunismon" K-do Demidjuk ne havas aliajn argumentojn ol tiujn pri "personaj atakoj", lia tezo estas tute senvalora. Mi konsilas al li legi pli atente la verkaron de Lenin k tie li ankaŭ trovos "personajn atakojn". Estas iafoje ja necese nomi katon kato k denunciston fripono. En sia "testamento", dokumento preskaŭ tute nekonata en Sovetio, Lenin tre klare diras sian opinion pri personoj; li ankaŭ opiniis necese k utile ĝuste koni k taski ilin. Eble mi tre surprizos K-don Demidjuk, se mi sciigas, ke la aludita de li artikolo ĝuste venigis el Sovetio mem leteron, en kiu oni povas legi: "La artikolo havas tute bolŝevikan karakteron". Nu, eble estis la sola "bolŝevika" artikolo, kiun mi verkis en mia vivo! Mi cetere tute ne deziras verki duan — sed oni ne devigu min...

Mi plie konfesas — neniel pentante —, ke neniam venis al mi en la cerbon la ideo fari el SAT *amas-*

---

fine kondamniĝas al baldaŭa morto. Tial ni agu — sed ni devus havi fortan, bone funkciantan organizon. Traleginte la raporton de K-do Ŝvarc, mi opinias, ke ni jam havas la materialon por tiu ĉi reorganizado. Mi nun proponas al la sekcianoj, a) ke K-do Ŝvarc havigu al si la rimedojn ktp. por publikigo de porjunula bulteno monata aŭ sessemajna, k raportu al la Sekcio. Ĉar mi tre sincere opinias, ke, se ni havus nian propran memstaran bultenon anstataŭ nur "Paĝo", ĝi sentigus al ni respondecon; b) ke ĉiuj junk-doj dezirantaj fariĝi aktivaj SAT-junsekcianoj, prezentu siajn adresojn al la sekciestro por interlanda raportado de por- k per-junulaj kunvenegoj. Ĉi tio kondukos la Gek-dojn al pli da aktiveco en la vicoj de SAT, ĝi atentigos pli forte la jun-SAT-anojn rilate al la fakto, ke ili estas membroj de aktiva revoluciema organizo esperantista tutmonda; ankaŭ ĉi tiu informado konigos al ĉiuj la klasbatalon tutmondan en junularaj aferoj, tiel akirigante al la sekcianoj sennaciecan pririgardon koncerne la vivon de l' junularo; c) ke la jun-SAT-anoj starigu junularsekciojn en sialandaj LEA-oj: la laboro de tiuj sekcioj estu — esperantistigi k pretigi por SAT la jun-gelaboristojn; k laste d) por pli bone plenumi ĉi tiun laboron de la SAT-junulara sekcio, ke oni starigu junularan plenumkomitaton, enhavanta sekciestron, redaktoron de la sekcia organo — ĉu bulteno, ĉu nur "Paĝo" —, kasist(in)on k 7 Gek-dojn elektotajn el-inter la SAT-anoj. La komitatano estu respondeca en ĉiuj junularaj aferoj en sia mondparto.

Ĉu ĉi tiuj proponoj ne povos formi bazon por estigi fortan organizon? Ni ankaŭ rigardu al la estonto, — ĉar pli da gejunuloj aliĝos al SAT, post kiam ni atingos la plenaĝon. Do, ni diskutu pri la proponoj, utiligu nian Paĝon, k kiam ni povos fari nian propran statuton ellaborotan, tiam k nur tiam ni povos kontraŭbatali la faŝisman k nacian edukadon k kulturon, k pli bone antaŭenigi la SAT-movadon k la marŝadon de l' tutmonda laboranta junularo al pli bona, pli libera k pli bela vivo.

W. Latimer (10 637), Anglio.

Ĉu vi jam legis?

NACIISMO

de E. LANTI

Tiel recenzis pri ĝi en "Balkana Laboristo" *B. Ivanov:* "...La libro de K-do Lanti prezentas tre seriozan historian studon pri la deveno, evoluado k sekvoj de la naciismo. La aŭtoro traktas sian temon je *marksisma metodo,* kio faras la libron valorega. Sed ĝi ne estas seka ekspozo de historiaj faktoj. La aŭtoro multloke komentas tiujn lastajn k ĝuste ĉi komentoj meritas nian specialan atenton. Li tie ĉi distingiĝas kiel rimarkinda sociologo... Lingvaĵo k stilo estas klasikaj."

Formato 13×19 cm. — 124 pĝ. Prezo 1,30 mk. g.

Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

movadon. Tio estus ega iluzio, vana espero. Nur senpripensaj entuziasmuloj povas havi tian esperon. Eĉ se SAT havus 50 000 membrojn, mi cetere ne opinius, ke ĝi estas amasmovado. La laborista esperanta movado fariĝos amasa nur kiam la diversaj Internacioj estos alprenintaj esperanton, ĝin propagandos k aplikos... Tiam la nuntempa SAT ne havos vivrajton. Bedaŭrinde oni devas konstati, ke ni staras tre malproksime de tiu tago. Tial la intereso de l' laborista esperanta movado postulas unuecon, kuniĝon de ĉiuj fortoj por ke niaj klopodoj povu altiri finfine la atenton de la laboristaj Internacioj. Ni fakte estas tre malfortaj k tiuj sin blufas mem, kiuj opinias la malon.

Se la unueco estas necesa, oni sekve devas agi konsekvence; oni devas ebligi al ĉiuj tendencoj aliĝi al SAT. Niaj Sovetiaj K-doj devas kompreni, ke "ilia lando" reprezentas — bedaŭrinde — nur la sesonon de l' mondo. Ne estas mia kulpo, se grandegaj amasoj en Britio, Francio, Usono k aliaj kapitalistaj landoj ĝis nun ne ankoraŭ aliĝis al la politiko de Komintern. Ne estas mia kulpo, se aliĝis al SAT multaj anoj de la II-a Internacio k ke ili *laŭstatute* postulas respekton por sia tendenco. Ni devas paroli klare k sen intenca forsilento. Estas vere, ke nuntempe SAT *aspektas* malpli komunista ol antaŭ kvin aŭ ses jaroj. Malgraŭ tio, ke ni ĉiam atentis respekti ĉiujn tendencojn, estas tamen fakto, ke la komunista sentigis tre forte dum longa tempo sian influon. Tial ke la komunistoj montriĝis ĉiam tre aktivaj en la kunlaboro al la gazeto, tio aspektigis ĝin komunista. Kaj kiam, en la Kongresoj, socialdemokrataj K-doj riproĉis pro tio, ni nur povis respondi al ili: "Kunlaboru mem pli aktive; varbu al SAT en viaj vicoj k vi tiel atingos, ke *Sennaciulo* k SAT aspektu malpli komunistaj". K-do Demidjuk k aliaj nuntempaj opoziciuloj konsentis al tia respondo. Kaj kiam ili hodiaŭ plendas, ke nia organizo ne estas sufiĉe komunistaspekta, ni povas nur rediri al ili, kion ni diris al la socialistoj antaŭ kelkaj jaroj. Sed estas evidente, ke ni ne povas laŭstatute, laŭ la decidoj de ĉiuj niaj kongresoj, permesi, ke en artikoloj troviĝu insultoj por iu ajn tendenco.

Kaj ĉi tio estas la kerno de l' demando. Se oni volas *revizie* doni al SAT karakteron de agitpolitika aparato; se oni volas fari el ĝi kvazaŭ filion de partio, estas evidente, ke nia Asocio ne taŭgas en sia nuna formo. Tiaokaze oni proponu ŝanĝi la Statuton. Sed neniu el la plej ardaj opoziciuloj faras tion. Kaj estas tre signifa la fakto, ke kiam en Göteborg estis proponite aldoni al la Statuto du alineojn, kiuj pliklarigas la edukan celon de SAT, neniu komunisto tiam kontraŭbatalis tiun aldonon k Lanti tute ne bezonis insisti, kiel mensoge asertas "certa" persono, por ĝin akceptigi.

Sed mia respondo jam fariĝis pli longa ol mi planis; ĝis la proksima semajno!...

E. L.

ATENTIGO

Por eviti perdon de tempo k nenecesa korespond-afranko, la K-doj skribantaj al la Direkcio de SAT pri aferoj, kiuj rilatas la ĝeneralan gvidadon de la Asocio, bonvolu ne forgesi, ke nur a k t i v a j membroj, t. e. tiuj, kiuj abonas al "S-ulo", havas l a ŭ - s t a t u t e la rajton enmiksiĝi en tiuj aferoj. Ili do notu bone en la memoron, ke ni severe tenos nin je la Statuto.

LA C. K. de S. E. U. preparas novan friponaĵon

Kiel niaj legantoj jam scias, dank' al la klopodoj de "Peuvag"[1] ni sukcesis ricevi 1000 markojn el Moskvo. Sed kredeble, tio ne plaĉas al la ĝenerala sekretario de SEU. Pro tio li misuzas sian GPU-oficon por starigi novan embuskon kontraŭ nia mono. Oni juĝu mem, laŭ ekstrakto de protokolo n-o 21 de la 3. 10. 1930:

"...Oni aŭskultis leterojn de l' opoziciaj SAT-organizoj el eksterlando, rezoluciojn de protesto pri l' agoj de SAT flanke de Leningrada, Minska, Kerĉa, Stalinska, Kieva k. c. sovetiaj SAT-grupoj, kiuj interalie *postulas ĉesigi monpagon al kreditkonto de nuna SAT-Direkcio*. — Decidis: a) en Bulteno n-o 10/11 presi fruntartikolon pri aferstato en SAT; b) sendi proksimtempe informleteron[2] al lokaj SEU-organizoj pri nuna aferstato en SAT; c) aliĝi al la eldonejo "Ekrelo" en Lajpcig; kiel reprezentanton de SEU elekti K-don Demidjuk.

Ĝenerala Sekretario de CK de SEU:
Drezen."

Jam en la n-o 301 ni publikigis karton de Drezen, adresitan al K-do Lerĥner, per kiu li ŝantaĝe[3] al nia Adm. deklaris, ke li ne volas klopodi por faciligi transsendon de mono al SAT. Nun, kiam malgraŭ liaj kaŝaj intrigoj, ni povis esperi ricevi monon dum la jaro 1931, li instigas grupojn agiti por ke oni ne sendu monon al SAT.

Ni preferas ne vortigi nian indignon k lasi al la Legantaro mem la zorgon kvalifiki tian agadon.

[1] Vd. n-on 320 de "S-ulo".
[2] Vd. ekstrakton el tiu "letero" ĉi sube.
[3] Minacpostule.

Korekto. En n-o 321, necesas legi la *unuan linion* de l' (lasta) paĝo 72 sur paĝo 71 supre, dekstra kolono, kie ĝi mankas en la teksto. Tiu linio estas malĝuste lokita ĉe la prespretigo de l' n-o.

LA INSIDO DAŬRAS

"......, la 21. 11. 1930.

Kara K-do! Mi estas membro de SEU. Hodiaŭ mi ricevis cirkulerleteron de CK de SEU pri la stato en SAT... En la letero temas pri tio, ke la SAT-gvidantaro kalumnias kontraŭ Sovetio k ĝiaj gvidantoj k estas priskribataj ankoraŭ multaj teruroj. La letero finiĝis per la vortoj (mi tradukas la ruslingvan tekston de l' let.):

"B o j k o t i 'Sennaciulon' pro ĝia nuna dekstra oportunista pozicio. Vigle disvolvi abonon al 'Internaciisto' k kunlabori en ĝi. Senvualigi anojn de Lanti inter sovetaj esperantistoj, starigante demandon pri ilia restado en SEU, se ili obstine defendas la dekstrajn oportunistajn opiniojn de Lanti. Propagandi k disvastigi inter siaj eksterlandaj korespondantoj la eldonaĵojn de EKRELO (Eldonejo kooperativa de revolucia esperanta literaturo)[1].

CK de SEU".

Mi transskribis nur apartajn lokojn el la letero de CK de SEU. Estas tre interesa, ke CK de SEU ankaŭ minacas per esceptoj kontraŭ K-doj, kiuj *memstare* trovas sian rilaton al taskoj k problemoj de nia movado.

"Vi estas multe insultata en tiu letero. Mi volas scii veron k petas vin priskribi al mi la veran staton en SAT. Mi ankaŭ dezirus ricevi "S-ulo"n de la unua de aprilo 1930 ĝis la lasta numero. Povas esti, ke iu K-do sendos ĝin al mi, *mi sendos al li interŝanĝe, kion li volos*. Mi esperas, ke en "S-ulo" mi trovos respondon al mia demando..."

Ankoraŭ pri parazitemo inter SAT-anoj

Mi tre simpatias al la K-do, kiu lastatempe suferis ekspluaton de kelkaj alilanduloj k tute subtenas ĉiujn liajn plendojn tiurilate, ĉar okazis simila sperto ĉe mi lastan jaron, verŝajne pro la de li menciitaj tri vizitintoj. Ili alvenis vespere, petante, ke mi gastigu ilin. Mi tion faris, kvankam estis ĝena afero, ĉar mi havas nefortan edzinon. Anstataŭ konformiĝi al la kutimo de la familio, ili faris kiel en hotelo k atendis, ke ĉio estu preta je la ĝusta momento, kiam ili bezonis ĝin. Je la tria tago mi sciigis, ke mi ne plu povas gastigi ilin pro la sanstato de mia edzino. Mi ne estas senlabora, sed malgraŭ tio mia financa stato ne toleras la senliman gastigadon al vizitantoj precipe neinvititaj. Ne petante ili prenis poŝtmarkojn, regalis sin ĝis mia lasta cigaredo k eĉ uzis la vizaĝpudron de mia edzino: kien ajn ni veturis, mi ĉiam pagis la veturkoston; sume la kosto al mi dum la du noktoj k tri tagoj estis 30 markoj. SAT ne kresku

[1] Vd. pri tiu institucio n-on 320 (p. 63).

per tio, ke ĝiaj anoj parazite vivu je la kosto de aliaj. *Eks-peranto.*

TRA LA MOVADO ◆
KRONIKO

BRITIO. Leeds. La oficiala organo de l'Brita Socialista Dimanĉ-lerneja movado *(The Young Socialist)* enpresis tradukon de unu ĉapitro el "Kion rakontas la amikoj de Peĉjo", kiun tradukis laŭ la SAT-eldono K-do 8048. Per letero la redakcio promesis presigi ĉiun rakonteton el tiu libro, kiam loko permesos. — *FRANCIO. Limoges.* 3 kursoj laŭ parola metodo malfermiĝis en oktobro, 1 ĉe la sidejo de l'neŭtrala societo, 2-a en Laborborso (gvidas K-do Gicquel), 3-a en laborista rondo (gvidas: K-dino M. Rameau). Tiu ĉi K-dino faris, je 7. nov., lekcion en alia lab. rondo antaŭ proks. 80 ĉeestantoj, kiuj petis kurson ekde 1. jan. — *SOVETIO. Niĵni-Novgorod.* Je 2. 3. 30 estis organizita kurso ĉe "Ruĝkruca" urbkomitato kun 40 lern. en 2 grupoj; gvidis K-do G. A. Konovalov laŭ lernlibroj Rublov k "Esp. k Ruĝa Kruco" (Ergolski). La lasta, malgraŭ reklamo de CK SEU, ne sufiĉe taŭgis pro sia neŭtraleca, burĝa, antaŭrevolucia karaktero. En marto formiĝis IRH-kurso en Kanavino kun 10 p. (gvid. K-do Valatiĉev). Sume ekstudis 272 p. en 17 kursoj; fine restis 57 p. en 5 kursoj aŭ 21% el la komencintoj. La aliaj kursoj pro objektivaj k subjektivaj, div. kaŭzoj disfalis k ĉesis funkcii post kelkaj lecionoj. Perfektigan kurson finis en junio 6 p. (gvid. K-do Konovalov). Novaj SEU-ĉeloj ne formiĝis, malnova ĉelo ĉe Telefonfabriko en Miza disfalis. En Miza la laboro ĉefe malsukcesis, ĉar plejmulto el studantoj estis lernejanoj, kiuj ne povas pagi la sufiĉe altan kotizon al SEU. En marto K-do Malutin organizis ekspozicion ĉe N-Radio-regimento. 14. 4. K-do Konovalov faris 15-minutan radioparoladon ĉe loka stacio memore je Zamenhof; 18. 4. okazis Z-memorkunveno, kie raportis K-do Konovalov. Je 1. majo partoprenis lernantoj de lernejo "Bakunin" propriniciative kun granda esp-afiŝo la manifestacion. Pluraj lernejaj rondetoj interligiĝis koresponde kun multaj landoj (ĉ. 15 el ricevitaj leteroj aperis en murĵurnaloj). En gazetoj (urbaj k fabrikaj) aperis pli ol 40 notoj k leteroj, en murĵurnaloj proks. 30 (de 1. 10. 29 ĝis 1. 8. 30). En sama periodo estis ricevitaj el eksterlando 325 leteroj, forsenditaj 210. La internacia interligo estis organizita malbone (ne sisteme). La redakcio de l'loka tagĵurnalo rilatas malfavore al ni (ĉar la Moskva "Lab.-Kamparana Koresp." malrekomendas uzon de esp-o); la red. opinias, ke ĉiuj eksterl. esp-istoj estas social demokratoj, kun kiuj ili ne volas havi rilatojn. La junkom. ĵurnalo "Leninsk. Smena" kontraŭe rilatas favore al esp-o k volonte presas nian materialon. (Cetere distrikt kursoj por angla k germ. lingvoj en Kanavino ankaŭ nur vegetas, pro malfacilo de l'studado. Internacia interligo per nacilingvoj ne progresas, malgraŭ redakciaj instigoj.) Je 1. 8. 30 la gruparo havis 65 membrojn (anst 150 antaŭjare). Same abono al la gazeto malprogresis. De 1. 10. 29 ĝis 1. 6. 30 vendiĝis 292 libroj (inkl. lerna literaturo). La statistiko estas mizera kompare kun antaŭa jaro. La ejo kostas ĉiumonate 8 rublojn k "formanĝas" grandan parton de l'distrikt kom. enspezoj. Pri rilatoj inter SAT k SEU oni diskutis je 25. 7. k decidis peti CK SEU klopodi pri montranspago al SAT, ĉar la disvolviĝo de l'movado estas tre malhelpata precipe pro foresto de "S-ulo", tiel de ĉiu ŝatata k legata. *(Vjaĉeslav Kalaŝnikov, 1125 — Stalingrad.* Ĉi tie elektiĝis je 15. nov nova distrikta komitato en ĝenerala kunveno de esp-istoj.

Atentigo! K-doj metu sur siaj letero al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson.

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La urbestraro de Arnhem (Nederlando) disponigis al la Ĉe-Instituto grandan domon kun parko.

En Steyr (Aŭstrio) estas aranĝita ĉe la tiea garnizono la unua esp. kurso de la aŭstria armeo, kiun partoprenas 51 armeanoj.

En Riesa (Saksio, Germanio) partoprenas 194 infanoj en 11 kursoj ĉe la popollernejoj k ĉe supera reallernejo la esp. instruadon.

MEMORNOTO ◆

Represis el "S-ulo":

L'Eclaireur de l'Ain, Oyonnax, 16. 11., Konsumkoop. mov. en USSR (318), *Ŝkodovak* (Skoda-fabrikano), Plzen, 21. 11., Stalingrada alvoko, (318).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 20. 11., *Socialist Youth,* London, nov. (rubr.), *The Young Socialist,* Leeds, nov. (Fabeloj de H. Zur Mühlen, Petro), *Le Progrès,* Lyon, 12. 11., 17. 11., *L'Effort,* Lyon, 15. 11.

Pri SAT-Kongreso raportis:

The Wheatsheaf, Bournemouth, julio, okt.

Peresper. materialon enpresis:

L'Avant-Garde, Tours, 15. 11., *Udarnik,* Tuapse (Kaŭkazo), 7. 11.

Lucifer (liberpensula gazeto, monata), Bordeaux, notas ĉe sia titolo, ke ĝi korespondas en esperanto.

NIA POŜTO ◆

A. C. 26. — Ni transsendis vian let. en la kompostejon por prikonsidero.

Emba. — Kion signifas en unu el viaj versaĵoj la vorto "incesa"?

11 893. — Via materialo por "LNE" ricevita. Enmeto dependas de disponebla spaco, ĉar tiuj verkaĵoj estas tre ampleksaj.

10 504. — Kiam ni havos liberan lokon en felietona parto, ni enmetos vian skizon.

9951. — Via versaĵo estas bela; sed pro lokomanko ĝi bedaŭrinde ne povas aperi nuntempe. Ĉiuokaze ni utiligos ĝin je konvena tempo. *Red.*

KORESPONDADO

AŬSTRALIO

—24 j. K-do deziras amikiĝi kun K-dino por pli poste kunvivi. — Interŝ. fotojn, PK, PI. Adr.: J. Di Rago, *Richmond,* N. S. Wales.

FRANCIO

2 junkom. (19—20 j.) koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Skribu al: K-do Moreau Roger, faubourg Pont-Levis, *Saint Junien* (Haute Vienne).

—Kelkaj lernantoj koresp. kĉl, L, PK, PI, PM. Skribu al: K-do A. Leininger, 21 rue des Romains, *Amnéville* (Moselle).

GERMANIO

K-do Kurt Friedrich, Talstr. 10, *Gränitz Post Grosshartmannsdorf* i/Sa. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do Otto Martin, Andrestr. 5, *Chemnitz,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

—2 K-doj koresp. kĉl, precipe pri politikaj temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata. Adr.: Otto Lingner, Schiessgraben 18, H.-*Schkeuditz.*

—15 gelernantoj veturontaj al la Olimpio en Vieno koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: Herbert Gutte, Richard-Wagner-Str. 4, *Gera/Th.*

K-do Anton Apfelthaler, Stolpener Str. 8, *Radeberg/Sa.,* kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do Ernst Georgi, Dechenstr. 32, *Merkstein II./Aachen,* kun gesportuloj ĉl. por renkonti nin dum la Olimpio en Vieno 1931. Resp. garantiata.

—Interŝ. 50 div. PM de Danzig kontraŭ la sama kvanto de aliaj landoj. Resp. garantiata. Adr.: K-do Alfred Richter, Geilenkirchener Str. 425, *Merkstein II/Aachen.*

K-do Karl Böhm, *Kleinhessen/Pleisse i. Sa.,* kĉl, L, PK, PI, bfl. Resp. garantiata.

NEDERLANDO

—5 geknaboj (13—15 j.) koresp. kĉl. gelernantoj samaĝaj, L, PI. Adr.: K-dino M. van Essen, *Marken-Binnen ap. Wormerveer.*

POLIO

K-do A. Pasmanik Nowomiejska, 26, *Lodz,* kĉl, PI, Resp. garantiata.

—2 K-doj (tajloro k tibiingisto) koresp. kĉl. samprofesianoj, precipe kun francaj. Adr.: Leo Bornŝtajn, Konstantynowska, 45, *Lodz.*

—*Esp-istoj ĉl. atentu!* — Jam de longe mi estas senlabora k serĉas nun iun ajn laboron (mi estas fumaĵisto). Bonv. informi min k sendi paperaĵojn. Adr.: Ersz. N. Szapiro, *Ciechanowiec,* Woj. Bialystocki.

SVEDIO

—Svedo koresp. kun eksterlandanoj, precipe de Japanio, Hindio k Ĉinio. Adr.: Eric Fredin "Kronan" *Gunnarstorp.*

POLLANDANOJ — ATENTU!

La Sekretariejo de Laborista Esperantista Societo "Praca-Laboro" en Pollando alpaŝis al preparado de ĝenerala

ADRESLIBRO de pollandaj esperantistoj.

Por ke la forto de l'laborista esp. movado en Pollando estu digne en ĝi respegulita k reprezentata, ĉiuj lab. esp-istoj devas en ĝi troviĝi. Pro tio ili estas petataj sendi sian aliĝon al la Redakcio de l'libro, por ricevi de tie detalan prospekton. — La libro kostos ĉe antaŭabono 2 zl., post la presigo 3 zl. Rapidu do antaŭmendi al la adreso: Jan Zawada, sekr. "Laboro", *WARSZAWA,* M. O. Czerniaków, ul. Zaciszna 2 (Pollando).

Aperis:

LA MORTADO

de prof. d-o HERMANN NOTHNAGEL

El germana lingvo tradukis Bernhard Selzer, Wien Sekretario de Aŭstria Esperanto-Delegitaro.

La problemo pri mortado profunde okupanta k kortuŝanta la homan genton de eterne estas tie ĉi en interesa maniero priparolita en klara k populara lingvo de prof. d-o NOTHNAGEL, unuaranga medicina scienculo, kiu dum sia tuta vivo profunde studis k esploradis ĉiujn ĝiajn kaŭzojn k fazojn. La libro valore pliriĉigas nian popular-sciencan literaturon k ĝia enhavo bone taŭgas po grupaj lekcioj.

Prezo: 1 germ. mk. + 10% sendkostoj.

Mendebla pere de Administracio de SAT Colmstr. 1, Leipzig O 27.

ENHAVO

	paĝo
Centjara soleno de kultura hontaĵo	81—82
El Francio	82
Kontraŭmilita amaskunveno en Bern	83
La klasbatalo tra la mondo	83—84
Kiel propagandisto en Anglio	83—84
Centra Domo de Kamparano	84
Pripensinde	84
Frenezaĵoj	84
Junulara Paĝo	85—86
Tra Esperantio	86—88
Korespondado	88

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)